



Majstro de altaro de Polling

Kandelfesto

La 2an de februaro oni celebras la prezentadon de Jesuo ĉe la Templo. Tiun tagon oni nomigas populare la *Kandelfesto*, ĉar je tiu tago oni benas la kandelojn, simbolo de Kristo “lumo por lumigi la popolojn”.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĵirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Dek helpoj — pri la dekalogo	3
Mirinda rakontaĵo	8
Vola submetiĝo al Dio	9
La Sveda Eklezio petas pardonon de la sameoj	10
Ni memoras Kristanan Kongreson en Legnica, 2021	12
Ĉi-jara Kristana Kongreso en Domaszék, 2022	14
Kerstin Hesselgren kaj demokratio	17
Ŝrumpanta streko kaj aliaj fenomenoj	18
La karnavala mardo	20
Memore al: Britta Rehm	22
Memore al: Vera Tuinder	23
Kanto: Adiaŭ, mond'! Mi iras for	24

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, venis informo ke du karaj membroj de KELI forpasis dum la pasintaj monatoj. Estis Britta Rehm el Svedio kaj Vera Tuinder el Nederlando. Certe la plej multaj legantoj konis ilin, ĉar ili siatempe estis tre aktivaj kaj partoprenis multajn kongresojn. Ni gardu iliajn memorojn!

En pluraj landoj la registaroj forigas aŭ mildigas la limigojn starigitajn pro la pandemio, ĉar la pandemio ne plu estas konsiderata esti socie danĝera. Do la socio iom post iom provas rekapti sian kutiman vivmanieron kaj, ekzemple en Svedio, vojaĝagentejoj rimarkas denove vekitan kaj kreskantan intereson vojaĝi eksterlanden. Tio signifas ke ankaŭ ni povas esperi kaj plani renkontiĝojn dum kongresoj kaj aliaj eventoj, ekzemple en Hungario ĉi-somere. Vidu paĝon 14 kaj aliĝu!

Dek helpoj — pri la Dekalogo

József Farkas, hungara reformita pastoro

Tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

En la mezo de la 1960aj jaroj József Farkas havis predik-serion pri la dekalogo. Volontuloj surbendigis kaj tajpis liajn predikojn kaj tiel disigis liajn pensojn ĉien en la mondon. Oni ankaŭ petis lin, ke li eldonu tiujn predikojn, sed li ĉiam respondis: “Mi akceptas nur miajn skribaĵojn, predikojn, kiujn mi faris en la lastaj kvin jaroj. Al la ŝanĝo de la mondo, al la novaj problemoj Dio sendas aktualajn mesaĝojn, admonojn, forton. La mesaĝon, kiun mi ricevis antaŭ 30 jaroj, mi ne povas uzi hodiaŭ”.

En la lastaj jaroj de sia vivo mia avo tamen akceptis la peton kaj multe okupiĝis pri la dekalogo. Post lia morto, en tirkesto de lia skribtablo, troviĝis la preta manuskripto, signite, ke li permesas publikigi tion.

Ni metu flanken niajn hereditajn angoron kaj timon pri dekalogo kaj ni permesu, ke ili povu esti veraj helpiloj en nia vivo!

Enkonduko

Letero de Paŭlo al la Galatoj 3:1–2 kaj 24–27:

Malsaĝaj Galatoj, kiu prisorĉis vin? Jesuo Mesio ja estis klare priskribita al vi kiel krucumito! Nur tion ĉi mi volas aŭdi de vi: ĉu la Spiriton vi ricevis pro la agoj de l' Torao aŭ ĉar en fido vi aŭskultis?

Do la Torao fariĝis por ni vartisto ĝis <la veno de> Mesio, por ke ni estu justigitaj el fido. Sed ĉar nun venis la fido, ni ne plu dependas de tiu vartisto. Ĉar vi ĉiuj estas infanoj de Dio per la fido, en Mesio Jesuo. Ĉar ĉiuj kiuj estis baptitaj al Mesio, estis vestitaj per Mesio.

Dum preskaŭ dudekjara laboro mi diris ĉirkaŭ 2500 predikojn. Interese mi eĉ unufoje ne predikis pri la dekalogo. Mi faris ĉirkaŭ kvindek preleg-seriojn, kiam dum unu semajno ĉiuvespere mi parolis pri unu temo, sed eĉ unufoje mi ne parolis pri la dekalogo. Mi nun ŝatus klarigi, kial.

Mia baza principo estis, ke en kristana preĝejo oni devas prediki pri Jesuo, kaj nek pri la leĝo, nek pri la dekalogo. Tio ĉi estas mia konvinko, kaj ĝin mi sekvis dum dek ok jaroj. Mi devas prediki pri Jesuo Kristo, pri la evangelio – indulgon oni devas prediki kaj ne leĝon. Mi aldonas al tiu ĉi statistiko, ke en ĉiu jaro minimume unufoje mi predikis kaj faris ankaŭ serion pri la perdita filo.

Unu el la bazaj mizeroj de la kristanaj eklezioj estas la moralumado, la prediko pri moralo. La plej multaj kristanoj – inkluzive la pastoroj – tiel kutimas paroli pri la dekalogo, kvazaŭ Paŭlo neniam estus inter ni kaj li neniam estus klariginta al ni, kio estas la rolo de la dekalogo en la vivo de kristana homo. Tute forgesinte Paŭlon, en la kristanaj eklezioj (katolika, evangelika, baptista, reformita) oni predikas leĝon, kvankam nia heredaĵo de Jesuo Kristo estas, ke ni prediku indulgon.

Kaj en la eklezia, kaj en la sekulara mondo elformiĝis vere primitiva teologia pensado: Dio donis al ni dekalogon, kiu estas granda trezoro, kolektaĵo de reguloj pri la homa vivo. Pro tio Dio donis la dekalogon, ke ni sekvu ĝin. Tiu estas bona kristano, kiu sekvas, kaj tiu saviĝos — kiu ne, ne.

Laŭ tiu ĉi simpla penso vivas homoj. Kaj el tio elformiĝas poste tiu simpla fanfaronado, ke mi estas bona homo, mi ne ŝtelis, mi ne mortigis, mi ne adultis — kaj daŭrigas la ordonojn — do eĉ Dio ne povas puni min, ĉar mi estas ordema homo.

La sekva penso estas — kion fari, ni estas homoj, ni eraras, plene ni ne

sukcesas teni la regulojn. Sed ne gravas, ĉar Dio estas bona, tiun malgrandaĵon, kiun ni ne sukcesas teni, li pardondonos al ni. Tio estas la populara teologio.

Mi tute certas, ke tiu ĉi pensmaniero havas neniun kontakton kun kristanismo. Mi pro tio ne predikis pri la dekalogo, ĉar mi volis nepre eviti eĉ la eblecon, ke oni pensu, ke ankaŭ mi predikas tiun ĉi primitivan teologion.

Kristanismo ne estas leĝ-religio, sed estas indulg-religio.

La esenco de la leĝ-religio estas, ke homo volas plenumi la leĝon kaj tiel volas stari antaŭ Dio. La esenco de indulg-religio estas, ke ne la agado de la homo decidas, sed la amo de Dio.

La leĝ-religio scias pri serioza, rigora Dio kiu kiel juĝisto sidas alte, atentis pri homoj, kiel ili plenumas la leĝon, kiom da reguloj tenas, kiom ne tenas kaj poste Dio decidas. Dio pasive atentis kaj poste juĝas.

La kristana kredo estas, ke Dio estas nia ĉiela patro, kiu rapidas helpi nin, venas antaŭ nin, montras la vojon, donas konsolon, pardonon, forton, por ke ekde nun ni sukcesu fari pli bone. Tiun venon antaŭ nin kaj helpadon ni nomas indulgo.



Parto de la Kumran-rulaĵoj, enhavanta la plej malnovan pluekzistantan kopion de la Dekalogo. Ĝi estas datita al la frua herodiana periodo, inter 30 kaj 1 a.K

Kristanismo estas indulg-religio, kiu signifas, ke ne tio gravas, kion faras la homo, sed tio, kion faras Dio, ĉar de Li venas la indulgo.

Kaj kion faris Dio? Li sendis Jesuon Kriston! Dio en Jesuo Kristo prenis niajn pekojn, donis al ni medikamenton, lumon, amikon, pastoron al la homoj. Tra Jesuo Kristo Dio tenas la manon de la malforta, malsana, kulpa homo, kaj resanigas, konsolas, gvidas lin. La sumigo de tiuj mizerikordaj Diaj agoj estas kristanismo. Kiam Dio jam faris tiujn kaj la homo akceptis tiujn — tiam povas komenci iu respondado, signo de danko, kiel homo respondas al la agadoj de Dio.

Tiel ni nun pensu pri la vortoj de Paŭlo! Tiuj ĉi versikloj klare montras, ke tiel estas la afero, kiel mi nun klarigas al vi. Tion diras Paŭlo: “Malsaĝaj Galatoj, kiu prisorĉis vin?” Iu malbono okazis en la galataj komunumoj. Kio okazis tie? Galatio estis provinco kun urboj, aperis tie Paŭlo kaj komencis prediki. Ĉu li predikis la dekalogon? Kompreneble ne! Li predikis Jesuon Kriston, tiel li diris: “Jesuo Mesio ja estis klare priskribita al vi kiel krucumito!”

Klare montriĝas, kio okazis. Paŭlo aperis en Galatio, predikis pri Kristo, kaj precipe pri tio, kio okazis dum la lasta semajno de la vivo de Kristo, pri la krucumado kaj la resurekto. Tio plenigis per ĝojo la korojn de la galatoj, donis al ili novan vivon, ili fariĝis gefratoj, fariĝis komunumo. Tiujn multajn okazaĵojn Paŭlo tiel sumigas: Vi ricevis la Sanktan Spiriton. Eltorentis sur vin la Sankta Spirito, la spirito de amo, paco kaj nova

vivo. Paŭlo predikis Kriston, la evangelion, la pekardonon, kaj Dio tiel benis lian predikon, ke eltorentis Sankta Spirito, kaj komencis labori la fortoj de heleco kaj Dia amo, Dia potenco. Kaj poste venis konfuzo, ĉar Paŭlo daŭrigis sian laboron, iris al aliaj lokoj fari sian mision. Kaj de Jerusalemo venis al Galato fanatikuloj de la leĝo, faris konfuzon kaj diris: ne sufiĉas, kion Paŭlo diris. Tio nur tiam estas vero, se poste venas la cirkumcido, la sabato, la moseaj leĝoj. Ili diris al la galatoj: atentu, ĉar nur tiam vi saviĝos, se al tio, kion vi aŭdis de Paŭlo, vi ankaŭ aldonas la leĝon.

Fariĝis granda konfuzo, malcerteco, kaj la informo pri tio atingis Paŭlon kaj li tre malbonhumoriĝis. Ĉu ne estas terure, ke oni detruas mian konstruan laboron kaj instruas, ke la leĝo estas pli grava ol Kristo? Pro tio Paŭlo diras: malsaĝaj galatoj! Ĉu de la penado teni la leĝon vi ricevis Sanktan Spiriton? Ĉu vi ne tiel ricevis la Sanktan Spiriton, ke vi rigardis Jesuon, aŭskultis la parolon pri li, kaj dum mi malkovris antaŭ vi la sekretojn de Jesuo — tiam plenigis viajn korojn la forto? Ĉu vi ne komprenas, ke tiu ĉi forto venas el la prediko pri Jesuo?

El tiu ĉi prakristana diskuto ni komprenu la esencon: Tie estas kristanismo, kie torentas la Spirito, la Spirito de Dio kaj ĝi plenigas la homojn kaj formas ilin al novaj homoj.

Kristanismo ne estas serio de homaj klopodoj, sed estas serio de Diaj benoj.

Kristanismo ne estas de subo al supro grimrado, sed de supro subvenena amo de Dio.

La ĉirkaŭbrako de Dio iras suben, en la profundon kaj suprenlevas nin.

Tie estas kristanismo, kie moviĝas Diaj fortoj — kaj Dia forto ne tie moviĝas, kie homo penadas pleniĝi la dekalogon, sed tie, kie oni predikas pri Kristo. Mi pro tio neniam predikis pri la dekalogo, ĉar mi certis, ke se mi minacas la homojn — tiam ne estos Sankta Spirito, ne estas komunumo, nur tiam estos Sankta Spirito kaj komunumo, se ni plezuriĝas pri Kristo.

Tie ĉi ni povas demandi: se estas tiel, ĉu tio signifas, ke la dekalogo tute ne havas gravecon? Kial estas en la Biblio? Iun rolon ĝi certe havas en la vivo de kristana homo? Kompreneble ĝi havas rolon, sed multe pli modestan lokon, ol oni pensas en la vulgara teologio, en la teologiumado de la simplaj homoj.

Mi certas, ke ni povas paroli pri la dekalogo — se ni metas ĝin en sian lokon.



Moseo kun la dekalogo. Jusepe de Ribera (1591–1652)

Ĉar ne estas en sia loko la dekalogo, se ni pensas, ke ni tiam saviĝos, se ni pleniĝas la leĝon. Se ni komprenas, ke ni saviĝos per la indulgo de Dio — tiam ni povas serĉi, en la savanta amo de Dio, kio estas la rolo de la dekalogo.

Kristanismo eraris, kulpis, kiam ĝi en la lastaj jarcentoj elprenis la dekalogon el la interrilato de Biblio, dirante, ke la juda ĉirkaŭaĵo ne gravas, ne esencas. Moseo, la monto de Sinajo ne gravas, la esenco estas, ke ni ricevis la ĉiaman Dian ordonon. Ni ne parolu pri Moseo, tiuj dek grandiozaj verecoj estu la fundamento kaj tiel ni vivu nian homan vivon. Do niaj antaŭuloj tute elprenis la dekalogon el la teksto, el la interrilatoj.

Tio bone sonas — sed ne estas la vero. La dekalogo ne havas la pretendon, ke ĝi estu baza leĝo de la tuta homaro! Tiel oni eraris, ke ili ne komprenis la gravecon de la unua frazo: “Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco.” La radiko de la dekalogo estas, ke unue Dio faris ion, kaj poste petas ion de la popolo kiel respondon. Unue Dio elkondukis la popolon el Egipto. Tiun elirpunkton oni devas konsideri: Dio liberigis sian popolon kaj poste kiel alianca versiklo venis la dekalogo. Kiun Dio ne elkondukis el Egipto, kial al tiu estu deviga la dekalogo?

Tio estas la ĉiama interrilato: Dio faras ion, kaj poste petas nin, ke ni agu kaj vivu en harmonio je lia liberigado. Tio estas la esenco de nia scio pri la dekalogo. Se ni tion komprenas, ni komprenas la tutan kristanisman.

Por ke ni pli bone komprenu tion, mi ŝatus diri al vi, ke antaŭ kelkaj jaroj Dio

benis mian helpantan laboron kaj mi sukcesis savi viron for de memmortigado. — Se vi vidus la dankegon el liaj okuloj!

Ĉar unue mi donis ion al li, helpon, konsolon. Li tiel sentis, ke mi savis lin el morto kaj pro la ĝojo de tiu savado li serĉis, kiel li povus esprimi sian dankon.

Kaj tio estas la graveco de la leĝo, kaj la graveco de kristanismo: Dio savas nin el damno, el peka vivo, kaj ni tiel multe ĝojas pro tio, ke tiu granda ĝojego igas nin vivi laŭ la volo de Dio.

Sed kiun Dio ne savis, tiu ne sentis tiun grandan ĝojegon — kial vivi laŭ la volo de Dio? Tiel estiĝis la moderna nihilismo, kiu ne volis scii pri Dio, pri dekalogo.

Do ne tio estas en la Biblio: *jen, tie ĉi estas la ĉiama ordo, vi plenigu!* Kiu tiel predikas, nenion scias pri kristanismo.

Ni devas rigardi al Dio, kiu elprenis nin el la profundo, kiu donis al kaj por ni Kriston kaj, memorante pri la amo de Dio, homo komencas demandi: se Dio tiel multe amas min, kiel mi devas vivi? Kaj kiam mi volas per danko respondi al la amo de Dio, tiam aperas iumaniere la leĝo.

La sekreto de la savado ne estas, ke mi plenigas la leĝon. La sekreto de mia savado estas, ke Dio amas min, kaj Kristo donis sian vivon por mi.

Dum mia animzorga laboro ofte mi devas sperti, ke pro la erara pensado pri la leĝo, kiom multaj problemoj povas okazi, kiom multaj vivoj povas detruigi.

Venas al mi gepatroj, kiuj travivis ion el la amo de Dio, ricevis la Sanktan Spiriton, fariĝis kredantoj kaj per ĝojo vivis laŭ la ordo de Dio. Kaj ili per-

forteme volis, ke ankaŭ iliaj infanoj vivu tiun vivon — kiuj ne ricevis, ne spertis la spiriton de Dio. La infanoj provas, klopodas fari tion, sed venas la tempo kiam ili ne plu povas, ribelas, protestas, kaj ofte la plej religiemaj gepatroj havas pli ateistajn infanojn, ol ateistaj gepatroj havas.

Ni ne la leĝon devas instrui al niaj infanoj, sed diri honeste: “Mia filo, mia filino, mi ŝatus sekvi Kriston. Mi ne tro bone sukcesas, sed Li kaptis mian koron kaj mi certas, ke Li pravas.” Ke ni amas Kriston, tion ni devas transdoni, kaj la forton, kiun ni ricevas de Kristo.

Mi finas per konfeso, kaj vi pensadu, ĉu ankaŭ ĉe vi estas tiel? Mi sentas, ke ju pli forte vivas la deziro en mia koro, ke estus bone pli fidele sekvi Jesuon, des pli multe mi klopodas vivi honestan, etikan, puran vivon. La amo de Kristo tenas min sur la bona vojo.

Estas katastrofo, se mi pro tio ne pekas, ĉar mi timas punon! Ĉu vi pensas, ke Dio ĝojas pri homoj, kiuj nur pro tio ne kulpas, ĉar ili timas pri la puno de Dio? Mi ne kredas je tia Dio.

Mi kredas, ke Dio tiam ĝojas, se iu amas Lin. Se homo stumblante amas Lin, tiam Dio pli multe ĝojas, ol se homo timege amas Lin.

Dio amas nin, kaj esperas gajni nian amon, kaj ke ni pro la amo sekvu liajn ordonojn. En tiu ĉi amo estas malstreĉo, estas paciĝo: Mia Sinjoro, mi ŝatus esti via pli inda, pli merita filo.

Se pro mia ĝojego mi volas fari tion, kion Dio volas, tiam Dio ĝojas.



Mirinda rakontaĵo

Ricevita de Miloš ŠVÁČEK, CZ

Virino eliris el domo kaj ekvidis tri blankharajn maljunulojn sidantajn en la antaŭo de la korto. Ŝi ne ekkonis ilin. Ŝi al ili diris: “Mi vin ne konas, sed certe vi malsatas. Bonvolu eniri por ion manĝi.”

“Ĉu la dommastro estas hejme?”, ili demandis.

“Ne”, ŝi respondis.

“Tial do ni ne povas eniri”, ili respondis.

Vespere, kiam la edzo revenis, la edzino diris al li, kio okazis. “Iru kaj diru al ili, ke mi estas hejme kaj invitu ilin.”

La virino eliris eksteren invitante virojn eniri.

“Ni ne povas kune eniri la domon”, ili respondis.

“Kial ne?”, ŝi demandis.

Unu el la maljunuloj komencis tion klarigi. Li montrante al unu el ili diris: “Lia nomo estas Sano”. Li montris al la dua: “Tiu ĉi nomiĝas Sukceso kaj mia nomo estas Amo.” Poste li aldonis: “Nun iru kaj pridiskutu kun via edzo, kiun el ni vi volas en via domo havi.”

La virino revenis kaj diris, kion ŝi aŭdis. Ŝia edzo tre ekĝojis. “Kiel agrable!” li diris. “Konsidere al tiu ĉi situacio ni invitu Sanon. Li venu kaj plenigu nian domon per sano.”

Lia edzino ne konsentis. “Karulo, kial ne inviti Sukceson?”

La bopatrino, kiu aŭdis ilian interparolon, eniris la ĉambron kun sia propono: “Ĉu ne estus pli bone inviti Amon? Nia domo estus plenigita de amo!”

“Ni akceptu proponon de la bopatrino,” diris la edzo al sia edzino. Iru eksteren kaj invitu Amon, tio estos nia plej bona gasto.”

La virino eliris eksteren kaj demandis la tri virojn: “Kiu el vi estas Amo? Eniru, mi petas kaj estu nia gasto.”

La viro nomiĝanta Amo ekstaris kaj iris al la domo. La du ceteraj ankaŭ ekstaris kaj lin sekvis. La surprizita virino demandis Sanon kaj Sukceson: “Mi invitis nur Amon, kial ankaŭ vi iras?”



La maljunuloj kune respondis: “Se vi invitus Sanon aŭ Sukceson, la ceteraj du restus ekstere, sed vi invitis Amon kaj kien ajn li iras, ni iras kun li. Ĉie ajn, kie estas Amo, tie estas ankaŭ Sano kaj Sukceso!!!”

Mia deziro por vi ...

Tie, kie estas doloro, mi deziras al vi kvieton kaj pacon.

Tie, kie estas duboj, mi deziras renovigon de la konfido pri via

kapablo labori por akiri ilin.

Tie, kie estas laciĝo kaj senfortiĝo, mi deziras al vi komprenon, paciencon kaj novajn fortojn.

Tie, kie estas timo, mi deziras al vi amon kaj kuraĝon.

Vi povas la rakontaĵon sendi al viaj gamikoj, kiujn vi estimas kaj deziras al ili ĉion bonan (se tio estas ankaŭ persono, kiu tion al vi sendis, ne forgesu pri li/ŝi).

☪

Vola submetiĝo al Dio

Mark Hamme

Ĉu vi iam petis, ke Dio regu vian menson, koron, aŭ eĉ viajn agojn? Estas bonege, ke ni deziru submetiĝi al Dio! Sed, ĉu vere Dio ekregus niajn pensojn, sentojn, aŭ eĉ nian konduton? Memoru, ĉar ni havas liberan volon, Dio ĉiam proponas al ni obeon aŭ pekon, benon aŭ malbenon, la vivon aŭ la morton, laŭ Readmonoĵ 30,19. Do, la elektoj estas niaj, ne de Dio.

Anstataŭ naiva eraro aŭ peto farita senscie, kredante, ke Dio ekregu nin, povus kaŭzi disreviĝo, kiam Li ne faras tion! Eble ni konkludas, ke ni ne indas aŭ eĉ, ke Dio ne amas nin!

Kvankam ni devas iniciati obeon al Dio, Li ne forlasas nin sen helpo kun tio. Memoru la konsolon en Jesaja 30,21, kie la Eternulo promesas, ke Lia voĉo ĉiam diros al ni, kiun vojon ni devas iri, se ni estas tentata foriri de la vera vojo de Dio.

Ankaŭ, Jesuo promesis ne nur instrui ĉion al ni, sed ankaŭ rememorigi ĉion de la Vorto, kiun ni lernis. Tio signifas, ke ni bezonas studi la Vorton por ke ni memoru ĝin! Tiam ni aŭskultas Lian voĉon duafoje kiam Li rememorigas nin kion ni devas fari.

Konsolas min la fakto, ke kiam ni iniciatas obei Dion, Li helpas nin maksimume. En Filipianoj, ni legas, ke kiam ni pensas pri aferoj kiuj estas veraj, honestaj, justaj, ĉastaj, ŝatindaj kaj bonfamaj, kaj kiam ni praktikas piecon, la Dio de paco ŝirmos niajn korojn kaj mensojn. Filipianoj 4,8–10.

☪

La Sveda Eklezio petas pardonon de la sameoj

Raportis Leif NORDENSTORM, SE

Sameoj (aŭ laponoj) estas la nomo de popolo, kiu dum la tuta historia epoko loĝis en norda Skandinavio. Tradicie multaj sameoj laboris kiel boacobrelistoj kaj fiŝkaptistoj. En nia tempo nur ĉ. 5 % el la sameoj bredas boacojn. La ceteraj laboras en ĉiuj ajn profesioj, kiel ekz. instruistoj, flegistinoj k.t.p.

Jam dum la mezepoko sameoj havis kontaktojn kun kristanoj kaj komencis miksi la tradician samean religion kun kristanismo. Tre frue sameoj portis krucojn kaj kantis pri Virgulino Maria kaj pri Jesuo Kristo. Ankaŭ kelkaj sameoj

kristaniĝis, dum aliaj daŭre praktikis la tradician politeisman religion. En la 1700aj jaroj la eklezioj skandinavaj pliintensigis la misiadon inter la sameoj. La transiro al kristanismo ne ĉiam estis libervola. Ŝamanoj estis devigitaj ne plu uzi la ŝamanan tamburon. Samtempe la eklezioj kreis skribojn por kelkaj sameaj lingvoj. Pro la grandegaj distancoj en la Nordo la sameoj ne povis ĉiusemajne viziti preĝejon. Pro tio laikaj viroj — kaj kelkfoje virinoj — sameaj estis instruataj gvidi vilaĝajn diservojn. Pro tio ĉi kristanismo plifortiĝis inter sameoj.



La sveda ĉefepiskopino Antje Jackelén petas pardonon de la samea popolo. Fotis: Magnus Aronson/Ikon

Antaŭ kelkaj jaroj mi renkontis sameinon, kiu diris al mi ke "Ni sameoj estas tre kristana popolo". Ĉiusomere okazas plursemajna konfirmacia kurso por sameoj 14–15jaraj, en kiu partoprenas sameoj el tuta Svedio kaj Norvegio. La kursoj fariĝis tre popularaj, ĉar ĝi donas unikajn eblecojn por junaj gesameoj ekkoni unu la alian. La konfirmacia Diservo post la konfirmacia kurso estas la okazaĵo, en kiu kolektiĝas la plej granda nombro da sameoj entute.

Kvankam la sameoj estas "tre kristana popolo" tamen inter sameoj ekzistas memoroj pri maljustaĵoj: pri perforta misiado kaj pri internulejoj en la pasinta jarcento, kie vivis sameaj gelnantoj, kies gepatroj estis nomadoj. La kondiĉoj en la internulejoj ne ĉiam estis bonaj.

Pro tio ĉi ekestis la ideo, ke la Sveda Eklezio petu pardonon de la sameoj. Tio ĉi okazis la 24an de novembro 2021 en

la katedralo de Upsalo. Partoprenis nia germandevena ĉefepiskopino Antje Jackelén. Okazis aparta liturgio kun tradiciaj sameaj elementoj. Rezentantoj de la sameoj povis rakonti pri malĝustaĵoj. La ĉefepiskopo petis pardonon kaj reprezentantoj de la Sveda Eklezio prezentis kelkajn taskojn por la eklezio, ekzemple pli multe uzi la sameajn lingvojn kaj prediki la evangeliojn en maniero, kiu estas en kongruo kun la sama kulturo.

Mi — la raportanto — partoprenis kaj gvidis la kantadojn de Kyrie-alkvoj (Sinjoro, kompatu nin) kun porpetoj en Nordsamea lingvo. Mi devenas de norda Svedio, kaj genealogie estas miksaĵo Finno, Tornivalano kaj Sameo. Inter miaj prapatroj estis kaj la pastroj kiuj fervore misiis, kaj la ŝamano, kiu devis forlasi la ŝamanan tamburon.



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

30. januaro

Kompatema Dio, mi bone komprenu Vian humilecon, ĉar ĝi estas la fonto de la vera forto. Mi pruvu mian forton per helpo al malfortaj geamikoj. Porti la ŝarĝon de miaj gefratoj estu honoro por mi..



Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

Ni memoras Kristanan Kongreson en Legnica

Kiu okazis 7–14 aŭgusto 2021

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno

Olda FISCHER, CZ

Spite al la koronavirusa pandemio, povis mia edzino Gabriella Stier kaj mi partopreni en Kristana Kongreso 2021, kiu okazis en pola urbo Legnica. Legnica situas en sudokcidenta parto de Pollando, en Malsupra Silezio

Ni veturis el Brno trans Ústí nad Orlicí en lasta bohemia fervoja stacio Lichkov. Tie ni prenis polan trajnon kaj daŭrigis al Vroclavo.

Bedaŭrinde lokomotivo pola havis difekton, tial ni pli ol du horojn atendis novan trajnon. En Vroclavo ni trovis alian trajnon, kiu iris en Legnica-n. Kiam ni finis vojaĝon en Legnica, jam estis mallumo.

Nia kongresejo troviĝis en grandega Porpastra Domo. Ĝi estas grandega. Ĉie estis beleco kaj ordo.



En placo de la urbo Jawor. Gabriella Stier kaj Olda Fischer Fotis: Ekatarina Eugenia Popoviciu

Ni ricevis zorgeme preparitan Kongresan Libron, kie ni trovis ne nur programon, sed ankaŭ detalajn informojn pri interesaj personoj kaj vidindaĵoj.

En la Kongreso partoprenis 52 esperantistoj. Plimulto el ili venis el Pollando, kvin el Ĉeĥa Respubliko, kvar el Hungario, tri el Rumanio kaj po unu el Francio kaj Svedio.

Esperantistoj-komencantoj anstataŭ prelegoj lernis esperanton en kurso.

Krom la kantaro Adoru ni uzadis la kantaron Lernado per Kantado, kie estis esperantigitaj tekstoj de 74 kantoj. Ofte al ni mankis sperta muzikisto.

Temo de la kongreso estis ekologia. Ni rememoris la 15an versiklon de la 2a ĉapitro de la libro Genezo: “Kaj Dio la Eternulo prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena, por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin.”

La 8an de aŭgusto ni vizitis post-cistercianan monaĥejan komplekson en Lubiąż, kie ni aŭskultis koncerton de muzika grupo “Kamerata Autentik”.

Post reveno kaj bongusta vespermanĝo, ni ĝuis amuzan vesperon, kiu estis muzika. La programon gvidis kaj komentis Teresa Pomorska. Siajn kapablecojn kanti kaj ludi muzikajn instrumentojn prezentis Wojciech Ławnikowicz, Jerzy Stefański, Inna Stawniczuk kaj junaj pianistinoj Aleksandra kaj Julia Czajka

Sekvantan tagon ni povis admiri la urbon Świdnica de sur renovigita urbodoma turo (2012), kiu estas 58 m alta kaj havas 10 etaĝojn. Trezoro de Świdnica estas Kirko de Paco el la 17a jarcento, kiu estas la plej granda ligna preĝejo en Eŭropo.

Belegan vesperon por ni preparis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Bengt Olof Åradsson kaj André Åradsson. Tio estis Biblia Vespero. Ni sidis ĉirkaŭ la tablo, sur kiu estis preparitaj kartoj kun bibliaj citatoj. Ni prenis po unu karton, laŭte tralegis la citaton kaj rakontis, kion por ni la citato signifas, kiel ni ĝin komprenas kaj kiel Dio influis nian vivon. Tiu vespero al mi tre plaĉis kaj mi rekomendas ĝin iam ripeti

En la urbo Bolesławiec ni trarigardis fabrikon por ceramikaĵoj. Ni aprezis bonegan laboron de Pavol Petrík, kiu bravure interpretis ĉiujn informojn de ĉiĉeronoj.

La fabriko estas unu el la plej grandaj produktantoj de manfaritaj kaj mane ornamitaj tablaj ceramikaĵoj. Sed tie laboro estas malfacila. Precipe laboro en polvoplena laborejo kaj kun certe venenaj

koloriloj (ekz. blua kolorilo enhavas kobalton, ruĝkolora kolorilo enhavas manganon ktp.) estas neenviinda.

El prelegoj al mi tre plaĉis la prelego de Bengt Olof Åradsson pri juna sveda ekologia perantino Greta Thunberg. Li sian prelegon akompanis per fragmentoj de video pri parolado de Greta Thunberg. Homaro jam influis klimaton de tuta planedo. Degelo de glacimontoj, vastaj brulegoj en sudamerikaj praarbaroj kaj siberiaj arbaroj, smogo en urboj, manko de akvo kaj inundoj, elmortado de multaj plantaj kaj bestaj specioj, tio estas sekvoj de sopiro pri riĉigo. Ekonomiaj interesoj ofte venkas ekologiajn strebojn.

Oni devas homojn ekologie eduki ekde infanaĝo. Grażyna Szubryczyńska prelegis pri sia ekologia edukado en infanĝardeno.

Kontaktoj kun polaj esperantistoj kontinuas. La 21an de septembro 2021 Anna Cisło, patrino de la junaj pianistinoj kiuj ludis dum la kongreso, vizitis nian Esperantistan Klubon en Brno.

Venonta Kristana Kongreso kaj la 71a kongreso de KELI okazos en Hungario (Domaszék, 16-23 julio 2022).

☪



Kirko de Paco en Świdnica. Fotis: Olda Fischer

Kristana Kongreso

16–23 julio 2022

Domaszék, Hungario



Kristana kongreso
71-a kongreso de KELI

16–23 julio 2022
Domaszék, Hungario

Miaj geamikoj, dum nia ĉijara kongreso ni vizitos belegan hungaran urbon: Szeged!

La aliĝilon al nia kunveno vi trovas en Dia Regno, numero 5/2021 kaj vi ankaŭ trovas ĉian bezonatan informon en la *facebook*-paĝo Kristana Kongreso.

Ĉiujn kore invitas kaj atendas en la nomo de LKK:
Ágnes Ráczkevy-Eötvös

Szeged estas urbego kaj kuracbanloko ĉe la suda limo de Hungario, kaj estas ankaŭ sidloko de romkatolika diocezo.

Szeged estas la kultura kaj ekonomia centro de la regiono, ĝi famas pro sia ruĝa papriko, la salamo de Pick kaj speciala dialekto.

La loko estis loĝata jam dum la neolitiko. Szeged fondiĝis, evoluis sur la dekstra bordo de la rivero Tiso, sed poste ĝi etendiĝis sur la maldekstra bordo, sude de la rivero Mures. Sur Mures alvenis precipe salo kaj ligno. Tial la urbo estis granda komerca urbo kaj grava trapasejo. La unua skriba mencio okazis en 1183. Ekde 1242 la komunumo estis



Turo el la 13a jarcento
Váradi Zsolt (CC BY-SA 3.0)



La rivero Tiso, la muzeo kaj la teatro en Szeged.
Fotis: István Takács. (CC BY-SA 3.0)

departementejo de Csongrád. En 1498 Szeged ricevis rangon libera reĝa urbo. La mezepokan fortikaĵon la turkoj okupis kaj tre longe firme tenis. Dum la turka erao ĝi estis grava urbo ankaŭ por la turkoj.

En 1854 la urbon trairis fervojo Budapeŝto-Suda Danubo, kiu komence estis la plej grava linio post Budapeŝto-Vieno. La urbon tre damaĝis la granda inundo en la jaro 1879, la 12an de marto, kiam nokte la rivero trarompis la digon kaj inundis la urbon. Tiam el 5723 loĝejoj restis nur 265. El la tuta Eŭropo alvenis donacoj por rekonstrui la urbon. La nova urbo iĝis logika kun avenuoj, bulvaroj.

En 1919 la franca armeo okupadis la urbon, krome ariĝis burĝono de hungara armeo, kiun estris Miklós Horthy. En tiu urbo ne okazis “Konsilantara Respubliko”. Post la packontrakto de Trianon 1920, Szeged iĝis limoproksima urbo. Hungario tiam perdis grandan parton de la lando, kaj tiam translokiĝis la Scienca Universitato de Kolozsvár [eo: Kluĵo] al Szeged.

Szeged posedas multajn historiajn konstruaĵojn kaj placojn, allogante multajn turistojn.

Inter la plej belaj placoj de la urbo estas Széchenyi tér (tér = placo) kun la Urbodomo en la pleja urbocentro. Havante multajn plantojn, statuojn kaj fontanojn, ĝi invitas al promenado kaj ofte gastigas kulturajn eventojn.

Sude de la placo, Széchenyi sekvas la straton Kárász, la plej granda vendeja strato de la urbo, kiu gvidas tra placo Klauzál al placo Dugonics.

Ĉe placo Klauzál troviĝas unu el la plej konataj kaj grandaj kafejoj de la urbo, kun nomo Virág (signifas Floro). Tie la revoluciulo Lajos Kossuth de la balkono de domo Kárász dum 1849 lastfoje parolis al la popolo, antaŭ ol ekvivi en ekzilo. La placon Dugonics dominas impona fontano kaj la administrejo de la universitato de Szeged.

Sudoriente de la Dugonics tér situas la plej



La universitato de Szeged
Fotis: Váradi Zsolt (CC BY-SA 3.0)



La katedralo de Szeged
Fotis: Lennert B (CC BY-SA 3.0)



La ortodoksa preĝejo Sankta Nikoleo en Szeged. Fotis: Plazma, Public domain



Muzeo Ferenc Móra Fotis: Váradi Zsolt (CC BY-SA 3.0)

konata urba placo kun la urba katedralo. Dum ĝia starigo oni trovis la restojn de la antikva turo Demetrius, kiu post restaŭro viziteblas kaj estas la plej malnova urba konstruaĵo. La placon flankigas la nacia memorejo Panteono, kie per statuoj kaj bustoj oni honorigas famajn personojn de la publika, politika kaj scienca vivo de Hungario. Plia allogaĵo estas muzika horloĝo ĉe la norda flanko de la placo, kiu ĉiutage je 12:15 kaj je 16:15 sonorigas naŭ-minutan melodiaron kaj montras figuraron. Dum somero kadre de subĉiela teatra festivalo oni montras operojn kaj dramojn ĉi-tie. Vidalvide de la katedralo situas serbe-ortodoksa preĝejo konstruita inter 1773 kaj 1778. Ene de ĝi vidindas ikonostazo kun 80 ikonoj, skulptitaj el pira ligno en rokoka stilo.

En direkto al la rivero Tiso kaj poste norden al la ponto Belvárosi sekvas placo Roosevelt. Tie troveblas la Muzeo Ferenc Móra, nomita laŭ hungara verkisto, kiu fondis ĝin. En la muzeo troveblas ekspozicioj pri la frua historio de la regiono kaj arkeologiaj trovaĵoj pri la historia popolo de Avaroj, sed ankaŭ ekspozicioj ekzemple pri arto, scienco, farmacio kaj memoriga ekspozicio pri Ferenc Móra (1879–1934).

En la proksimeco troveblas la Nacia Teatro, konstruita dum 1883 en novbaroka stilo.



Nacia Teatro en Szeged Fotis: Váradi Zsolt (CC BY-SA 3.0)

Kerstin Hesselgren kaj demokratio

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Antaŭ 100 jaroj, en 1922, la unua virino (Kerstin Hesselgren) prenis sian seĝon en la sveda parlamento. La jaron antaŭe, la virinoj ricevis la rajton voĉdoni, kaj ek de tiam ni kalkulas ke Svedio havas ĝeneralan voĉdonrajton.

Fakte, la lingva uzado ŝanĝiĝis pro tio. Kiel alparoli la parlamentanojn, kiam nur unu virino sidas inter la viroj? Komence la prezidanto de la parlamento alparolis per la salutvortoj “Mina herrar” [Sinjoroj] ĉar ne sonis bone diri “Min dam och mina herrar” [Sinjorino kaj sinjoroj] kaj tiele akcenti la virinan ĉeeston. Ankaŭ la titolo “riksdagsman” [parlamentviro] post iom da tempo ŝanĝiĝis al la neŭtrala “riksdagsledamot” [parlamentano].

100 jarojn poste, ni vivas, kion ni ĉiuj certe opinias, en stabila demokratia socio. Demokratio estas kaj maniero organizi niajn sociojn kaj maniero solvi la demandon pri rega potenco. Antaŭe oni metis demokration je unu flanko kaj diktaturon je la alia, kiel du esence apartaj formoj de regado, sed en politika scienco hodiaŭ ekzistas samopinio ke troviĝas kelkaj tielnomataj hibridaj reĝimoj.

Kiam ni hodiaŭ uzas la esprimon demokratio, ĝi ankaŭ inkluzivas aferojn, kiuj iras preter la baza ideo: la jurŝtato kaj fundamentaj homaj rajtoj. Do ne nur la reganta plimulto havas rajtojn, sed ankaŭ la minoritato. La ĝeneralaj principoj de demokratio estas:



Kerstin Hesselgren

- Malfermaj kaj justaj elektoj kun universala kaj egala balotrajto.
- Liberecoj kaj rajtoj de la individuo por kontraŭstari la tiranecon de la plimulto en socio.
- Ĉiuj civitanoj havu la samajn realajn ŝancojn partopreni en la socio kaj uzi siajn politikajn rajtojn. Tio ankaŭ signifas strebi al pli egala distribuado de rimedoj en la socio.
- Ekzisto de racia interŝanĝo de opinioj kaj racia politika diskurso en la publika sfero.
- La graveco ke ĉiuj partoprenu kaj ankaŭ popola partopreno en ĉiuj sferoj de socio kaj politiko.

Ĉu ni trankvile povas ripozi opiniante ke nia demokratio estas stabila aŭ kiel ni daŭre gardu kaj defendu ĝin kontraŭ misuzo kaj iom-post-ioma detruigo? ❧

Ŝrumpanta streko kaj aliaj fenomenoj

Adrian de Haan, NL

En presitaj tekstoj kaj en tekstoj sur komputila ekrano aperas diversaj horizontalaj strekoj. Pleje oftas -, – kaj — kaj –. Ili nomiĝas laŭ siaj funkcioj: la unua (la plej mallonga) estas konata kiel dividostreko, la dua kaj tria kiel haltostreko (kurta kaj longa), la kvara kiel minussigno. Kelkaj tipografoj kaj Bertilo Wennergren (PMEG, p.18) konas plie la ĝisstrekon (“pli longa ol dividostreko, sed malpli longa ol haltostreko”), sed jam ekde meze de la 20a jarcento ĝi (preskaŭ tute) malaperis. Poste kelkaj strekoj perdis funkciojn aŭ la ŝaton de tipografoj.

La dividostreko brave sin tenis. Ĝi eĉ alprenis signifojn kaj funkciojn de aliaj strekoj. Jam baldaŭ ĝi aldone signifis ‘ĝis’. Do ‘aŭgusto-septembro’ ni legas ‘de aŭgusto ĝis septembro’. Poste ĝi komencis forpuŝi aliajn strekojn. Ofte ni nun vidas la dividostrekon en la rolo de haltostreko, ĉefe antaŭ kaj malantaŭ parentezo: ‘Dum mia ĝisnuna vivo - do preskaŭ kvindek jarojn! - mi loĝis en ĉi tiu domo.’ Pri tiu uzo Wennergren (PMEG, p.1.2) rimarkas: ‘Haltostreko povas esti samforma kiel dividostreko, sed en preciza tipografio ĝi estu pli longa.’ Sed elekto de dividostreko anstataŭ haltostreko povas esti estetika, profesia decido. Hodiaŭ multaj dezajnistoj/tipografoj ja alstrebas kvietan fizionomion de teksto. La leganton ne ĝenu spacoj de varia longo. Tiuj profesio-

uloj opinias ke tradicia haltostreko — precipe la longa kun ambaŭflanka spaco — kaŭzas ĝenan, malbelan interrompon en la regula fluo de teksto. Tial la longa haltostreko en multaj presajoj cedis lokon al la kurta. Kaj la kurta haltostreko foje estas cedanta lokon al la dividostreko. Eble ni konstata ke la haltostreko ŝrumpis. Tamen la longa haltostreko ankoraŭ ne malvenkis en tipografiaj produktoj el Britio kaj Norda Ameriko.

Ankaŭ en malpreciza tipografio ni ofte renkontas dividostrekojn, kiuj rolas kiel haltostrekoj. Tie la dividostrekoj estas nekonscie, ne-profesie uzitaj. Ili simple naskiĝis ĉar komputila klavaro (kiel la iama skribmaŝino ne montras diferencon inter halto- kaj dividostreko. Feliĉe Unikodo prezentas veran haltostrekon.

- haltostreko kurta: unikode ‘en dash’ U+2013 (vidu nivelon rilate ‘4’: –4).
- haltostreko longa: unikode ‘em dash’ U+2014.
- minussigno: unikode ‘minussign’ U+2212 (vidu nivelon rilate ‘4’: –4).
- × multiplika signo: unikode ‘multiplication sign’ U+00D7.

Tamen en pluraj presaĵoj mi mire vidas kombinon de halto- kaj dividostreko ĉirkaŭ parentezo. Sekve — erare kaj bedaŭrinde - [*sic!*] la haltostreka paro ne montriĝas kiel unuovolaj ĝemeloj. Jen malpreciza tipografio!

Surogataj signoj ofte anstataŭas la minussignon. Ni vidas en kalkulo (kun dividostreko): '100-35=65', aŭ (kun haltostreko): '100–35=65'. En pluraj tiparoj uzo de kvazaŭaj minussignoj kaŭzas malharmonion kun la egalo(=)-kaj plus(+)-signo, ĉar la alteco de la pozicioj malsamas. Tro simpla do estas la rimarko de Wennergren (PMEG, p.1.2) ke 'minussigno aspektas same kiel ĝisstreko aŭ haltostreko'. Mi tamen koncedu ke pluraj tiparoj malhavas propran minussignon.

Konekse al tiuj aritmetikaj signoj mi atentigas pri la oftega misuzo de la litero x kiel multiplika signo: '2x5=10'.

Ĝuste, laŭ harmonio de x kaj = estus: 2×5=10'.

Konklude

Kaŭze de la vasta uzo de personaj komputiloj kaj la facila aliro al interreto, amaso da tekstoj estas publicataj sen ĝustiga kunlaboro de tipografo. Ne estas mirige ke nin superŝutas sen-ordaj, amatorecaj tekstoj. Inter la tipografiaj pekaj la konfuza uzo de strekoj konsistigas gravan kategorion.

Esperantistoj lernu uzi Unikodon por trovi la specifajn grafemojn de sia alfabeto! Ili ankaŭ esploru Unikodon pri strekoj kaj aliaj helposignoj.

œ



Amikeco trans limoj

Semajno de Internacia Amikeco estas iniciato disvolvita en la Esperanto-komunumo, kaj festata ĉiujare dum la lasta plena semajno de februaro, do 21–27 de februaro ĉi-jare. La ideo estis lanĉita en 1968 de Erik Carlén, sveda KELI-ano. La Semajno unuafoje okazis en la jaro 1969, do en 2022 la festo okazos por la 53a fojo.

Kial ne sendi manskribitan poŝtkarton aŭ leteron al iu amik(in)o?

La karnavala mardo

Kontribuis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

La karnavala mardo estas la tago antaŭ la komenco de la granda paska fasto, la karesmo en la liturgia jaro, do la tago antaŭ la cindra merkredo.

La nomo mem montras la komencon de la fasto, ĉar en tiu ĉi tago oni lastfoje rajtas manĝi viandaĵojn. Ĉie en la mondo oni festas tiun tagon per diversaj festoj, popolaj kutimoj, kaj en multaj lokoj estas la lasta tago de karnavaloj aŭ festivaloj.

La franca nomo de la tago *Mardi gras*, laŭvorte signifas 'grasa mardo', pro tio ke oni grase manĝas. La angla nomo *Shrove Tuesday* [konfesiga mardo], aludas pri la purigado antaŭ la fasto.

La karnavala mardo estas la mardo post la sepa dimanĉo antaŭ Pasko.



La batalo de karnavalo kaj fasto. Pieter Bruegel la pli aĝa. 1559 (Kunsthistorisches Museum, Vieno)



Bakantoj de pankukoj. Pieter Aertsen 1560

Pri la etimologio de la vorto karnavalo troviĝas pluraj klarigoj. Laŭ unu klarigo la vorto karnavalo venas el la latina esprimo '*carne levare*', kio signifas forlasi la viandon.

Laŭ aliaj, la origino de la vorto venas el la esprimo '*carne vale*' – adiaŭo de viando

En Britujo apud la oficiala anglikana esprimo oni ankaŭ nomas la karnavalan mardon '*Pancake Day*' – krespa aŭ patkuka tago. La origino de la nomo venas el la 15a jarcento kaj per tio la nomon eblas klarigi, ke antaŭ la lasta tago de la fasto oni volis foruzi ĉiujn ovojn kaj grason, kaj la plej simpla kaj plej bongusta solvo fari tion: baki pankukon! Oni eĉ faris en tiu ĉi tago konkursojn, kie la konkurantoj per pato en la mano kuras, ofte en ŝercaj vestaĵoj, kaj tempo post tempo oni ankaŭ devas suprenĵeti kaj tiel turni la pankukojn.

Cindra merkredo

Merkredo de la cindroj estas la unua tago de la fastosezono de Karesmo por la plej multaj okcidentaj kristanaj eklezioj. Ĝi estas la kvardekseca tago antaŭ Pasko, la plej granda festo de la Kristana jaro, (la kvardeka, se oni ne nombras la dimanĉojn – ĉar ĉiu dimanĉo estas festotago de la reviviĝo de Kristo, kaj do ne povas esti tago de fasto). Ĝi do ĉiam devas esti merkredo.

Ĝi nomiĝis *Merkredo de la cindroj* ĉar laŭ la liturgia tradicio por tiu tago, la sacerdoto metas cindrojn sur la kapon de la kredantoj, kaj diras al ili: “Konvertiĝu kaj kreu al la evangelio” aŭ “Memoru ke vi estas cindro, kaj al cindro vi revenos”. Tiamaniere la sezono de Karesmo komencas kun rememoriĝo de nia morto – bonega kialo por la fasto kaj preĝado de Karesmo, kiuj estas por la kredantoj preparoj por la morto, ĉar ili celas remeti la kredanton en la bonan vojon kun Dio.

La origino de la ceremonio kaj celebrado kunligas la memoron al pentofara disciplino de la unuaj kristanaj jarcentoj kiam en tiu tago la publikaj pekintoj, nun petantaj la repacigon kun Dio kaj la eklezia komunumo, ricevis cindron sur la kapon kaj komencis eĉ ekstere kon-

duti laŭ pentofara maniero, por fine ricevi la repacigon dum la Sankta Semajno.

La surŝutado de la kapo per cindro ripetas similajn gestojn priskribitajn en la edifaj popolecaj rakontadoj kiel en Jona kaj Judito de la Malnova Testamento.

La okcidentaj (t. e. latinaj) katolikoj celebras ankoraŭ la cindran merkredon, kiam pastro markas per cindro krucon sur la frunto de kredantoj, kiel simbolo de memoro, ke oni mortos kaj oni iĝos cindro. Tio okazas la unuan tagon de Karesmo, post karnavaloj, por marki la komencon de dolora epoko de memorigo de la morto de Kristo.

Karesmo

Karesmo estas fasto de la kristana jaro, komencante post karnavalo ĉe la Merkredo de la cindroj kaj finante ĉe Pasko. Ĝi do daŭras la kvardek tagojn antaŭ Pasko, nenombrante la dimanĉojn. La dimanĉoj de Karesmo do ne estas nombrigitaj kiel tagoj de la kvardektaga fasto, ili tamen estas tagoj en la sezono de Karesmo.

Ĝi memorigas pri samtempa fastado de Jesuo en dezerto antaŭ lia ekprediko.

Iuj kristanoj kredas ke tiu sezono preparas la kristanojn por la Pasko, per la fasto kaj la preĝo, por ke ĉiuj povu festi Paskon en bona rilato kun Dio.

Sed aliaj kristanoj kredas la jenan biblian skribaĵon, kiu implikas ke per la Pasko mem (t.e. la morto kaj reviviĝo de Kristo), kaj ne per fastado/preĝado, oni povas havi bonan rilaton kun Dio: “ni, estante malamikoj, estas repacigitaj kun Dio per la morto de Lia Filo” (de Rom. 5)



Aspergante cindron sur la kapojn de adorantoj.
Julian Fałat (1853–1929)





Britta Rehm

1930–2021



Duonjaron post festo de sia 91a datreveno Britta forpasis en la maljunula hejmo en Gotenburgo, kie ŝi pasigis sian lastan tempon.

Brita estis vojaĝema kaj post 1968 ŝi partoprenis kongresojn de KELI kaj UEA multloke en la mondo. Budapeŝto estis ŝia plej favorata vojaĝcelo.

Ŝi estis LKK-membro de la gotenburga UEA-kongreso en 2003, estrarmembro de la gotenburga klubo kaj de Esperanto-Gården dum jaroj.

Britta ĉiam facile ridis kaj logis aliajn kunridi per amuzaj historietoj, precipe pri la konata gotenburga ŝercparo Kal kaj Ada.

Ni ĉiam memoros, ŝian gajan, petoleman humoron kaj rapidajn replikojn.

Geamikoj



Vera Tuinder

1935–2022



Unuan fojon mi renkontiĝis kun Vera kaj Jaques dum la KELI-kongreso en Edinburgo 1977. Survoje hejmen mi havis eblecon gastigi ĉe ili en ilia hejmo. Unu el pluraj agrablaj memoroj!

Vera kaj Jaques, ĉiam kune, ĉiam bonkoraj, ĉiam atentemaj pri aliaj. Kiel Siegfried Krüger skribis post la forpaso de Jaques “Kongresi kun Jacques kaj Vera estis ĉiam pliriĉiĝo”. Vere veraj vortoj.

En 2019, antaŭ la pandemio, mi kaj mia familio vizitis Vera en ŝia hejmo, kiam ni traveturis Nederlando. Kia bona kaj agrabla revido.

Ŝi mankos al ni, sed ni gardos ŝian memoron en niaj koroj.

Bengt Olof Åradsson



Pentraĵo farita de Vera



Adiaŭ, mond'! Mi iras for

M: ES GEHT EIN' DUNKLE WOLK' HEREIN




1. A - di - aŭ, mond'! Mi i - ras for
2. Pe - re - os vi sam - ki - el mi.
3. A - di - aŭ, mond'! Vin be - nu Di'!



el vi - a ĝoj', el vi - a plor'.
Trans - for - mos nin la kre - a Di'
Ĉar pa - tre Li, pa - tri - ne Ŝi,



A - di - aŭ! kaj: Bon - far - tu!
al no - va kre - i - ta - ĵo
es - tan - ta mem la A - mo,



Vi i - am se - kvos min. _____
sen aj - na lim', sen fin'. _____
per am' ĉir - kaŭ - as nin. _____

ADIAŬ, MOND'! MI IRAS FOR • M (Es geht ein' dunkle Wolk' herein): popola kanto laŭ la manuskripto de Johano Werlin OSB, monaĥejo Seeon, Bavarujo, 1646 • E (originale verkita kiel kontrafakturo): Albrecht Kronenberger 2021-10-10